

LINGVA KRITIKO

STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Cefredaktoro: Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung; Robert Kreuz, LK.; Prof. D-ro Ing-ro R. Orengo. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114)

VOL. I * N-RO 7

MONATA ALDONO AL HEROLDO DE ESPERANTO

AŬGUSTO 1932

Praktika progreso per teoria progreso.

Kial Esperanto ankoraŭ ne estas enkondukita en ĉiujn lernejojn? Pro la rezisto de sciencaj rondoj. Kial oni rezistas? Pri tio la esperantistoj ne sufiĉe atentis.

I. Motivoj de rezisto.

Jam antaŭ la mondmilito kelkaj universitataj lingvistoj esploris Esperanton. Ili deklaris, ke Esperanto devas elekti inter tri vojoj: fariĝi

1. aŭ trafiklingvo,
2. aŭ scienclingvo,
3. aŭ lingvo de belaj artoj,

ĉar tio, kio estas profito sur unu vojo, estas perdo sur alia vojo. Ekzemple sur vojo 2 oni bezonas grandan logikecon, kiu sur vojo 1 estas peza balasto; sur vojo 3 oni bezonas tre multajn radikojn, por havi multajn rimojn kaj plurajn eblecojn por la ritmo, aranĝojn, kiuj estas perdo sur vojo 1.

Filologoj, kiuj simpatias al Esperanto, konsilas al ni, rezigni pri vojo 3. Ili diras: „Multaj filologoj timas, ke la sekreta intenco de Esperanto estas la forigo de l' nacilingvoj; se la esperantistoj lasus la kampon de l' belaj artoj al la nacilingvoj, ili garantius la daŭran ekziston de l' nacilingvoj, kaj parto de la filologoj ne plu batalus kontraŭ Esperanto. Do rezignu pri vojo 3.“

Aliaj scienculoj, kiuj simpatias al Esperanto, konsilas al ni, unue fari surpaŝebla la vojon 2. Ili diras: „Via vortaro kaj afiksaro ne sufiĉas por nia scienca fako, viaj instru-libroj similas al tiuj de la subaj lernejklasoj; kapabligu Esperanton por la tradukado de fizikaj, ĥemiaj, teknikaj, juraj kaj filozofiaj verkoj, kaj ni rigardos vian lingvon kiel seriozajn. Do konstruu la vojon 2.“

II. Kion fari?

Ankaŭ post rezigno pri vojo 3 (specialaj lingvaj aranĝoj pro la poezio) ni devos kalkuli kun la fakto, ke tio, kio estas profito sur unu vojo, estas perdo sur la alia. Sed ekzistas rimedo por atingi, ke la konstruado de vojo 2 ne malhelpu la marŝadon sur vojo 1: Ni devas desegni klaran limon inter „Trafik-Esperanto“ kaj „Scienc-Esperanto“.

Ĉiu vortaro povus havi en „scienca aldon“ ĉiujn esprimojn, kiuj certe ne estas trovblaj en la ĉiutagaj gazetoj, ekz. maloftajn nomojn de bestoj, vegetaĵoj, korpartoj, malsanoj, ĥemiaĵoj*). Ĉiu instrulibro povus havi en „scienca aldon“ ĉiujn afiksojn, kiujn bezonas nur la scienca stilo. En la UEA-gazeto kaj kelkaj revuoj mi plurfoje legis la vorton „romanda“ = apartenanta al latinidlingva teritorio, sed en „Lingva Kri-

*) La limon povus montri la „ofteca libro“ de l' germana lingvo.

tiko“ n-ro 4, pĝ. 4, mi legis la vorton „romanika“. En la Pariza „Plena Vortaro“ mi trovis nek unu nek la alian vorton, sed mi trovis tie multajn nomojn de bestoj kaj vegetaĵoj, kiujn mi ne konas eĉ en mia gepatra lingvo. Se oni ŝovus tiujn scienc-nomojn en specialan „scienca aldon“ (aparte aĉeteblan), la parto „Trafik-Esperanto“ ne devus rezigni pri la ofte trovbla „romanda“.

La mallerteco de Ido ne estis, ke ĝi kreis novajn afiksojn por la sciencoj, sed estis, ke ĝi forgesis fari la limon inter trafiklingvo kaj scienclingvo. La nescienculo ne povas ekkoni, ĉu la germanan vorton „elektrisieren“ li traduku en Idon per elektragar, elektrizar, elektrifari, elektrigar, elektrozigar ktp. Sed la scienculo kelkfoje devas esprimi tiajn nuancojn.

La tasko de niaj lingvo-institucioj do estas:

1. pli malpezigi la Trafik-Esperanton (vojo 1),
2. pli logikigi la Scienc-Esperanton (vojo 2),
3. atentigi pri verkoj, kiuj pro rimo kaj ritmo enkondukas armeon da novvortoj (vojo 3),
4. nur decidi, post kiam ĉiuj motivoj kaj kontraŭmotivoj estas plene klarigitaj.

III. Lingva Komitato.

La taskoj 1 kaj 2 postulas homojn agemajn kaj kreemajn, la taskoj 3 kaj 4 male homojn malrapide agantajn kaj tre singardemajn, ĉar unu nebona decido (sonsimileco de intenco kaj intensa, ekz. li laboris intence dimanĉon) malutilas pli multe ol trohezito. La taskoj 1 kaj 2 bezonas antaŭen marŝantajn progresemlajn, la taskoj 3 kaj 4 homojn iomete konservemajn.

Studejo de Zamenhofa Gramatiko, Tokio:

Teksto-Kritiko de la Paroladoj de Zamenhof

laŭ Originala Verkaro de D-ro Dietterle.

En la nuna artikolo ni intencas kritiki la tekstojn de la Paroladoj de Zamenhof, kiel ili aperas en „Originala Verkaro“.

Nia celo de la kritiko estas esplori la dirmanieron de Zamenhof komparante diversajn tekstojn, kiujn ni povis akiri. Ni estos kontentaj, se ni povus montri unu flanketon de lia granda lingva sistemo, kiu prenos sian tutan formon, kiam ĉiu materialo, konstrumano ktp. estas plene esplorita.

Oni tamen ne pensu, ke ni nur blinde adoras lian sistemon kaj penas senkreditigi ĉian formon ne-Zamenhofan. Tion Zamenhof

La Lingva Komitato do devus havi du sekciojn: la esplorantan por la taskoj 1, 2, kaj la decidantan por la taskoj 3, 4. Ĉiu sekcio devus havi sian prezidanton. En la decidantan sekcion nur estu elektebla, kiu uzas Esperanton almenaŭ dum dek jaroj. En la esplorantan sekcion la prezidanto enirigu ĉiujn personojn, kiuj per propraj ideoj pliriĝigas nian teorion.

Kelkaj esperantistoj opinias, ke la Lingva Komitato tro malmulte decidis, ekz. pri la uzo de split (spliti, splitigi), arm (armo, armilo, armigilo), ord (orda, ordita, ordigita), fals (falsa, falsita, falsigita), korekt (korekta, korektita, korektigita), fiks (fiksa, fiksa, fiksigita). Sajnas al mi, ke la Lingva Komitato tute sufiĉe decidis, sed povus pli multe esplori. Niaj organizaĵoj ne estas ŝtataj sed libervolaj, do la ĉef-afero ne estas decidi sed konvinki per klara montrado al la motivoj. Kvarono de la membroj de l' Lingva Komitato ja unuope diligente laboris, sed kion faris la aliaj membroj por la Esperanto-teorio? Ili devus en ĉiuj landoj daŭre kontroli la novajn instru-librojn, la prilingvaj rimarkigojn de la naciaj gazetoj ktp., registri ĉiujn interesajn ideojn kaj raportoj pri ili al la sekcio pri vortaro aŭ al la sekcio pri gramatiko. Ĉiujn eble taŭgajn ideojn oni devus transdoni al la publika diskutado (ekz. en „Lingva Kritiko“), por kolekti motivojn por kaj kontraŭ ĉiu ebla decido; ĉar la ĉef-ideo de lingva institucio estu: „opinio sen motivo ne estas opinio sed persona gusto“. Ĉiujare por la mondkongreso devus aperi presita raporto pri ĉiuj diskutitaj demandoj kaj pri la kolektitaj motivoj.

Ĉi ĉiujn taskojn devus preni sur sin la „esploranta sekcio“ nove fondenda. La „decidanta sekcio“ (la nuna Lingva Komitato) ricevus tiujn raportojn, studadus ilin, kaj balotus, kiam oni opinias unu aŭ la alian demandon plene klarigita por decido.

A. W.

mem ne faris! Ni tamen kredas, ke Esperanto, kiel ajn ĝi jam ŝanĝiĝis aŭ ŝanĝigos de la tagoj, kiam Zamenhof skribis, havos ĉiam sian bazon sur Zamenhof. Nia peno do estas trovi la trunkon de Zamenhofa arbo, sur kiu ĉiuj estontaj branĉoj sane kreskos.

Oni ofte admonas, ke tia peno estas bagatela kaj vana, ĉar Zamenhof ne estas dio kaj povas erari, kaj lia stilo ne ĉiam povas esti la plej perfekta. Tio estas tro komprenebla por bezoni ian parolon. Sed tamen, se li „eraris“ kaj se tia „eraro“ ofte ripetigas, ĝi postulus nian seriozan studon, ĉar ĝi po-

vas esti unu ŝtonero en la konstruado de lia sistemo.

Ni elektis kiel tekston Originalan Verkaron pro tio, ke la laboro havas grandan signifon por tutmondaj esperantistoj, ĉar valoraj malnovaj dokumentoj nun rapide perdiĝas. Kaj ni kredas, ke la posedantoj de tiaj dokumentoj devas helpi pliperfektigi tian bazan laboron.

Pli detala kritiko de la Paroladoj baldaŭ aperos en la Rimarkoj aldonotaj al la dua eldono de la „Paroladoj de Zamenhof“ (eldonejo: Japana Esperanto-Asocio).

Mallongigoj.

R	La Revuo
LI	Lingvo Internacia
ED	Esp.-ista Dokumentaro
OG	Oficiala Gazeto
Möb	Möbusz: Dokumentoj de Esp.
Brüg	Brüggemann: Historio de Esp.
OV	Originala Verkaro
Schn	Fr. Schneeberger: Raporto
Ĉas-2	Ĉasopis Českých Esperantistu, Biblioteko, N-ro 2: „Deveno kaj Historio de Esperanto“
Ĉas	(sama Biblioteko) N-ro 7: „Vortoj de Zamenhof“.

(Kiam ni citis por referencoj el la Biblio, ni faris tion nur el la 8 apartaj libroj eldonitaj de Hachette kaj Ko., t. e. Genezo, Eliro, Levidoj, Nombroj, Readmono, Psalmaro, Sentencoj, Predikanto, pro tio, ke en la Biblio de la brita eldono ni trovas ke Zamenhofa stilo estas multloke ŝanĝita. Nia koncerno al la Biblio ĉe nia studo ne estas, ĉu la traduko estas pli fidela al la originalo, sed ĉu ĝi konservas la originalan plumon de Zamenhof aŭ ne.)

Unua Kongreso 1905 en Boulogne-sur-Mer.

Referencoj uzitaj
de OV: LI ED Schn Ĉas-2
de ni: LI ED Ĉas Möb Brüg

361-16/7. Ĝi estas la sonoj de io granda, kiu nun naskiĝas. Tiel staras ankaŭ en LI, ED, Möb, dum Ĉas kaj Brüg legas kio anstataŭ kiu. „Io . . . kiu“ formo ne estas kontraŭ-Zamenhofa. Nedifinita io estas pli precizigita en la subfrazo, kiel naskiĝantaĵo. Komparu OV 202-30/1: krei ion novan, kiu prezentas unu el la plej gravaj akiroj de nia afero . . .

361-26. fratoj, kiuj havis ĉiuj egalajn ideojn, egalan Dion. Ĉiuj tekstoj krom OV legas: fratoj, kiuj havis ĉiuj egalan korpon, egalan spiriton, egalajn kapablojn, egalajn idealojn, egalan Dion . . . Rimarku ke 6 vortoj estas elisitataj en OV, kaj ke idealojn en ĉiuj tekstoj estas en OV ideojn.

363-18/9. kun la perfekta flua parolado de aliaj personoj. Ĉiuj aliaj tekstoj legas perfekte anstataŭ perfekta, kiu kredeble estas preseraro.

364-32. kiam Esperanto aperis en la mondo. LI kaj ED legas akuzative mondon, ĉiuj aliaj tekstoj legas nominative mondo.

364-37. tre granda estas jam nia literaturo. Ĉiuj aliaj referencoj, LI, ED, Ĉas, Möb kaj Brüg legas: tre granda kaj vasta estas . . . La du vortoj kaj vasta mankas en OV.

365-9. la morto rabis al ni Josefon Wasniewski.

OV legas Josefon Wasniewski
Ĉas legas Jozefon Wasniewski
ED kaj Möb legas Jozefon Wasniewki (mankas s antaŭ w). Ĉiuj aliaj, LI, Brüg

legas: Jozefon Wasniewski. Zam uzis en la Biblio Jozef (nominative) kaj Jozefon (akuzative). Vidu ankaŭ OV 220-18: Jozef Wasniewski.

365-22. kiuj nun jam ne loĝas en nia mondo kaj. Ĉi tiuj vortoj mankas en ED kaj Möb. Ĉiuj aliaj ilin havas.

365-36/7. en la nuna momento staras inter miaj animaj okuloj nur tiu alta morala Forto. LI, ED kaj OV erare legas inter anstataŭ antaŭ. Ĉas kaj Brüg korekte legas: staras antaŭ miaj animaj okuloj. Komparu OV 373-36, 398-16, 408-31, Rabistoj 93-14, Fabeloj I 52-24, 109-13, 123-29.

Parolado en la Unua Ĝenerala Kunveno.

OV ref: LI ED OG Schn Germana Esp-isto.

Niaj ref: LI ED OG Kongres-libro Ĉas Möb Brüg. (OV ĉerpis el la raporto de Schneeberger, kiu povis erari en aŭdado kaj krome ĉi tiu parto estas ne kontrolebla per aliaj referencoj, tial ne tre dependebla.)

367-8/9. Poste en la sekvanta kongreso ĝi prezentos al ni. Se Zam efektive uzis ĉi tie sekvanta en estonta formo, ĉi tiu provizas unu el la tri ekzemploj de sekvanta de li uzitaj. Por la studentoj de Zam-stilo ni mencias, ke Zam neniam uzis sekvinta, kiel oni vidos el la malsupra listo.

	-anta	-onta	-inta
	loka	tempa	tempa
Batalo de l' V	—	1	—
Fabeloj I	3	29	—
Fabeloj II	—	24	—
Krestomatio	14	8	—
G. Dandin	—	—	—
Gimnazio	—	—	—
Hamleto	2	2	—
Ifigenio	—	—	—
Ling. Respondoj	7	—	—
Marta	1	6	1
Orig. Verkaro	7	6	2
Proverbaro	—	—	—
Rabeno de Bah	4	1	—
Rabistoj	—	—	—
Revizoro	—	—	—
Biblio:			
Genezo	—	—	—
Eliro	1	5	—
Levidoj	—	1	—
Nombroj	—	3	—
Readmono	—	—	—
Psalmaro	—	—	—
Sentencoj	—	—	—
Predikanto	—	—	—
	129	87	3 0

.Loka = „La sekvanta domo“.

.Tempa = „La sekvanta tago“.

Nia supozo pri lia prefero al -anta-formo estas, ke la vorto „sekv“ jam klare indikas ordon „poste iri“. Similan ekzemplon ni vidas en la vortoj esprimantaj ordon: antaŭiri, postiri ktp. Tiaj vortoj plej ofte staras en -anta-formo. Tamen la verboj ne montrantaj ordon nature postulas distingajn -anta, -inta kaj -onta: pasanta, pasinta, pasonta. Komparu Fabeloj II 15-17, Krestomatio 210-28 kaj -32, 259-24 kaj -25, 263-1, 267-8, OV 24-12, 231-25, kaj ankaŭ 62-21, 71-21 kaj -22, 87-5.

367-31/2. nenia volus akcepti sen ke ĝi ricevu ian privilegion. Sen ke estas certe treege malofita formo, trovebla nenie aliloke en la tuta Zam-ajo. Kvankam oni povus gramatike pravigi ĝin per analoga uzado de malgraŭ ke, por ke kaj tre malofte krom ke, li tamen dirus kaj kredeble diris: sen tio ke. (Daŭrigota.)

Pri la uzado de „kio“ kiel relativo.

La artikolo de Meguru Takahaŝi sub tiu rubriko (Lingva Kritiko n-ro 1 p. 3) sendube estas bazata sur metoda scienca esplorado de la verkoj de D-ro Zamenhof; la materialo kolektita de li sekve estas tre valora. Sed lia studo ŝajnas interesa ankaŭ pro tio, ke ĝi montras, kiom la rezultoj de esploro dependas de la premisoj.

S-ro T. anticipas konataj du kazojn, en kiuj estas relativpronomo uzata „kio“, nome:

I. se ĝi rilatas al korelativa vorto, kiu finiĝas per o;

II. se la rilatato estas tuta frazo ĝenerale.

Li trovis novan kazon; la rilatato ankaŭ povas esti:

III. superlativa aŭ „signife difinita“ adjektivo, kiu sekvas la artikolon, kaj post kiu neniu konkretaĵo estas subkomprenebla. (Do adjektivo esprimanta abstraktaĵon.)

Tre rimarkinde estas ankaŭ, ke tia adjektivo povas esti uzata substantive, kio ŝajnas ofendi la jenan regulon gramatikan: „Substantive oni ordinare ne uzas adjektivon“ (por esprimi abstraktaĵon).

La rezulto de s-ro T. ŝajnas baziĝi sur tio, ke li atentis nur vortojn esprimantajn, kaj rigardas kiel relativon ĉiam la vorton, kiu staras senpere antaŭ la relativo (escepte kiam ĉi tiu vorto rilatas al tuta frazo ĝenerale). — En ĉiuj cititaj frazoj la vorto antaŭ la relativo estas adjektivo. Estas sendube, ke la dependa frazo difinas tiun adjektivon. Ĉio do ŝajnas unuavide tute klara. Tamen sube mi provos montri, ke laŭ alia vojo oni povas veni al tute alia rezulto.

Por klarigi la aferon ni elektu la duan ekzemplon de s-ro T. Ni legas:

„Kiam oni edziĝis kun malbona virino, tiam la plej bona, kion oni povas fari, estas iri ĵeti sin en la akvon.“

Analizante la frazon, oni unue rimarkas, ke la superlativo estas rilata; sekve ĝi entenas la ideon de komparado inter la eroj de ia kolekto.

Kompleta propozicio do devas enhavi:

1-e esprimon por la kolekto,

2-e esprimon por la ero elektita, kaj inter ambaŭ

3-e la prepozicion el.

Post tio oni facile trovas, ke la koncerna frazo kompletigita povas teksti:

„Kiam oni edziĝis kun malbona virino, tiam la plej bona afero el ĉio, kion oni povas fari, estas iri ĵeti sin en la akvon.“

En ĉi tiu frazo la vorto ĉio evidente estas la rilatato. El tio ni povas konkludi, ke en la originala frazo la vera rilatato estas subkomprenebla ĉio (aŭ tio). La superlativon ni povas nomi ŝajna rilatato.

Ekzamenante la aliajn ekzemplojn kun superlativo kaj „kio“, ni ricevas similan rezultojn. Ankaŭ post la numeraloj adjektivaj: la unua, la dua k. s., oni povas subkompreni „afero el ĉio“. Do

„La unua afero el ĉio, kion ili aŭdis en ĉi tiu mondo, estis . . .“

Por la ekzemploj, en kiuj „la sola“ estas ŝajna rilatato, jam prezentis komenton s-ro Avril. Li skribas (Lingva Krit. n-ro 2 p. 4) jene:

„La sola, kion li klare vidis = la sola io, kion ktp.

Mankas, ŝajnas al mi, nur unu paŝo; „io“ estas pronomo nedifina, la koresponda formo difina estas „tio“. Do ni ne skribu „la sola io, kion li vidis“, sed:

Tio sola, kion li vidis . . .

Jen la sama rezulto, atingita laŭ alia — eble pli rekta — vojo. Estas konate, ke la artikolo difina en la latinidaj lingvoj devenas el la montra pronomo latina *ille, illa, illud* (Esp.: tiu, tio). Sekve ni povas diri, ke

la = tiu, tio (iom malfortigintaj).

Parenteze oni povas mencii, ke en kelkaj aliaj lingvoj, ekz. la germana, la artikolo difina estas samforma kun pronomo montra (korelativa).

La sola do povas egali:

1-e tiu sola,

2-e tio sola.

La jus dirita validas ankaŭ por la ekzemplo:

„Li pensis, ke la blanka, kion li vidis, estis nur ŝaŭmo sur la akvo.“

La blanka = tio blanka.

Do certe ne temas pri „forigenda germanismo“ aŭ „kripla formo“, kiel diras s-ro T. „La blanka“ verŝajne estas intenca formo; la servanto vidis ne objekton distingeblan, sed nur „ion blankan“.

Estas konsilinde, ke ni ne supozu — sen nepre neceso — erarojn en la klasikaj verkoj de D-ro Zamenhof. — La vorto „blanka“ ŝajnas malpli bona; la fakto, ke ĝi troviĝas en la „Fabeloj de Andersen“, pruvus ne multe, tiu kolekto ja aperis nur en 1923 t. e. longe post la morto de Zamenhof.

En ĉiuj jam preparolitaj ekzemploj, enhavantaj superlativon, la relativo rilatas al subkomprenata „ĉio“. Tamen ĝi povas ankaŭ rilati al „afero“. Tiukaze ni devas uzi la formon „kiu“.

S-ro T. citas nur unu ekzemplon, nome:

La plej bona, kiun mi neniam esperis atingi, estas al mi plenumita.

Ni povas skribi:

La plej bona (el ĉio, aŭ: el ĉiuj) afero, kiun mi neniam esperis atingi, . . .

Komprenoble ni povas forstreki la vortojn „el ĉio“.

Ankaŭ ĉi tie ni ne bezonas supozi eraron, kio estas granda avantaĝo.

(La ekzemplo troviĝas laŭ miaj libroj el Fabeloj I 65/22 kaj F. K. 56/7; do ambaŭ fontindikoj estas eraraj.)

Pri la aliaj ekzemploj kun „kiu“ mi havas opinion gravan por aldoni.

Ni do atingis jenan rezulton:

1. En ĉiu citita ekzemplo kun „kio“ la vera rilato estas „ĉio“ aŭ „tio“ subkomprenata.
2. En ĉiu ekzemplo kun „kiu“ la vera rilato estas substantivo subkomprenata.
3. La adjektivoj ne estas uzataj vere substantive.

Por ekspliki ĉiujn ekzemplojn, oni do bezonas starigi nur unu regulon, nome:

„Vorto subkomprenbla havas la saman efikon, kiel se ĝi estus esprimita.“

Akceptinte ĉi tiun regulon, ni eĉ povas kontentigi je la unua el la kazoj supre menciitaj. Se la rilato estas tuta frazo, oni ĉiam povas kunpensi „io“ antaŭ la relativo.

La „gvidpensoj“ de s-ro Schattat ŝajnas malfacile kompreneblaj kaj tro komplikaj. Kial distingi inter anstataŭi kaj rilati al? — Tio, kion li diras pri la diferenco inter ulo kaj aĵo ŝajnas eĉ nelogika.

Mi volas citi nur la ekzemplojn:

„La mallumaj, seriozaj montoj estis ĉiuj kovritaj de neĝo; la plej alta, kiu plej longe brilis, estis Parnaso.“ (F. I. 146/25.)

Post „alta“ estas subkomprenata „monto“. Se tiu ĉi vorto estus esprimita, estus indiferece, ĉu oni rigardus ĝin kiel personon aŭ kiel objekton; ĉiukaze oni devus uzi la pronomon „kiu“, ne „kio“. Kial ne apliki la saman regulon, nun kiam ĝi estas subkomprenata?

Novaj vortoj en Esperanto.

En la lasta tempo aperis du artikoloj sub la titolo „Internaciaj vortoj“. La unua, de Liem Tjong Hie, troviĝas en la februara numero de „Esperanto“, la dua, de Lejzerowicz, en n-ro 3 de „Lingva Kritiko“. Ambaŭ artikoloj pritraktas la danĝeron de la moderna Esperanta vortfabrikado. Mi ne citas la enhavon, ĉar verŝajne la plej multaj legantoj de Heroldo jam legis ilin. Cetere estus bone, se niaj plej gravaj gazetoj kaj revuoj havus lokon por represi la artikolon de Liem Tjong Hie. Liaj vidpunktoj estas tiom gravaj, ke la artikolo meritis tion.

Laŭ la nomitaj artikoloj la senĉesa kreado de novaj vortoj malfaciligas Esperanton, precipe al azianoj. Sed sendube ĝi samgrade malfaciligas ĝin al eŭropanoj, kiuj konas nur sian nacian lingvon. Tiu vidpunkto estas nepre atentinda. La ĉefa tasko de Esperanto estas, ke ĝi ebligu facilan internacian interkomprenon. Se ni enkondukas centojn kaj centojn da novaj vortoj nur por havigi rimojn aŭ esprimi kvazaŭsubtilajn nuancojn, ni havas nebonan koncepton pri la spirito kaj esenco de Esperanto.

Multaj diras, ke la novaj vortoj ne estas tiom danĝeraj: se ili estas nebonaj aŭ nedezirindaj, ili formortos per si mem. Tio estas verŝajna. Tamen ni ne pretervidu la impreson, kiun la vorteksperimentado faras al komencantoj kaj al neesperantistoj, kiuj okaze esploras la strukturon de nia lingvo.

Ŝajnas al mi, ke tiu afero estas tre atentinda ankaŭ el alia vidpunkto. La modernemuloj diras, ke la novaj vortoj pliriĝigas la lingvon. Komprenoble ili necesigas pli grandajn vortarojn. Sed ili neniel pliriĝigas la lingvon laŭkvalite. Efektive estas tute kontraŭe.

Vi komparu la stilon en verkoj de Zamenhof, Kabe, Bulthuis, Luyken kun la stilo en iu plenmoderna verko. En la unuaj la stilo estas simpla, klarega, plene komprenebla eĉ al komencanto. Kaj tiu simpleco ne signifas barbarecon aŭ nematurecon. Vera perfekteco ĉiam postulas simplecon kaj klarecon. Kaj due: en tiuj verkoj la vortoj ĉiam estas vere vivaj. Ili vere konkretigas al ni la enhavon de la frazoj, ofte pli forte ol faras multaj vortoj en nia propra nacia lingvo. Tiu lingvo estas vere vivanta. Kial? Ĉar la verkistoj aŭ tradukantoj uzas vortojn, kiuj estas plene vivaj por ĉiama uzado, kaj ĉar ili utiligas la esprimeblojn, kiuj enestas en la originala lingvo. Kaj tiamaniere Esperanto fariĝis vivanta lingvo.

Sed jen la plenmoderna verko. La simpleco kaj klareco ofte mankas. Estas en ĝi aro da novaj aŭ maloftaj vortoj, kiuj tute ne estas vivantaj. Sekve ili ankaŭ ne povas konkretigi pensojn kaj sentojn same kiel pli originaj kaj konataj vortoj. La leganto devas serĉi la signifon en diversaj vortaroj, eĉ nacilingvaj, kaj kiam li fine trovas ĝin, tiam la vorto faras al li same abstraktan impres-

Koncerne al la ŝajne substantiva uzado de adjektivo, mi volas rimarkigi, ke tiu ne estas ligita al la ĉeesto de relativo. En la sama fabelo, el kiu s-ro T. ĉerpis kelkajn ekzemplojn, ni ankaŭ legas:

„La plej bela kaj mirinda estis, ke la floroj odoras.“ (F. K. 37/11.)

„La plej bela estas kuŝi en la lumo de la luno.“ (F. K. 38/11.)

En ambaŭ frazoj oni povas subkompreni la vorton „afero“.

Erik Malmkvist, Stockholm.

on kiel cifero en iu matematika tabelo. Tio nepre ne estas vivanta lingvo.

Oni respondas: „Tio ja ne gravas. Se la vortoj ne estas bonaj, ili formortos.“ Bone. Sed dume restas neuzataj la grandaj esprimebloj, kiujn la origina Esperanto tamen enhavas, kaj kiuj ankoraŭ tute ne estas plene utiligitaj. Se iu nacia verkisto volas stile pliriĝigi sian lingvon, li devas utiligi la vortojn kaj esprimeblojn de sia propra lingvo. La samo validas rilate la veran evoluon de Esperanto.

Estas stranga opinio, kaj pri Esperanto kaj pri multajnaciaj lingvoj, ke oni bezonas multege da vortoj por krei belan kaj valoran verkon. Klarigo: da vortoj ni posedas sufiĉan kvanton, kaj ni estas lertaj babilantoj, sed pensoj kaj vivaj komprenaĵoj plej ofte mankas. Mi legis multajn verkojn en Esperanto, sed en neniu mi trovis, ke la modernemo en vortelekto (kaj stilo pliriĝigas aŭ plibeligas la enhavon de la verko). Plej lerta verkisto estas tiu, kiu povas diri kiel eble plej multe per kiel eble plej malmulte da vortoj, kiuj estas kompreneblaj al ĉiu. Tio validas rilate la naciajn lingvojn. Ĝi validas ankaŭ rilate Esperanton.

Oni diras, ke ni bezonas novajn vortojn por esprimi la multajn nuancojn. Vere, moderna vivo kaj modernaj lingvoj konsistas preskaŭ nur el nuancoj. Per lerta nuancado oni povas kredigi, ke migra objekto estas blanka. Sed ĉiuj nuancoj en kunmikso fariĝas grizgriza kolorkaĉo, kiu estas terure tuda.

Mi intencis fini tie ĉi, sed eble oni tro miskomprenus min. Tial ankoraŭ kelkajn vortojn. Komprenoble mi ne insistas, ke ni malpermesu novajn vortojn. Bezono de fakvortoj estas evidenta, kaj cetere ĝi ne havas ion komunan kun la „internaciaj vortoj“. Verŝajne ekzistas ankaŭ kelkaj pli malpli ordinariaj, tamen internaciaj, komprenaĵoj, por kiuj ni ĝis nun ne havas Esperanto-vortojn. Iom post iom ni devos enkonduki tiajn vortojn, se ni ne povos kunmeti ilin el Esperantaj elementoj. Sed certe tiaj komprenaĵoj — nome la vere bezonataj — estas tre malmultaj.

Ni enkonduku novajn vortojn nur kiam estas absolute necese. Ni uzu novajn kaj maloftajn vortojn nur kiam estas efektiva bezono. Multaj kreas aŭ uzas novajn vortojn certe nur pro tio, ke ili nesufiĉe konas la ekzistantajn Esperanto-vortojn. Almenaŭ mi en gazetoj trovis neologismojn, kiuj jam delonge havas absolute adekvatajn esprimojn en nia lingvo.

Kaj antaŭ ĉio ni atentu pri simpleco kaj klareco. Tiurilate ni certe iom malevoluigis Esperanton. Kvankam ja povas esti, ke kelkaj rigardas konvulsie torditajn frazojn kaj vortojn kiel signon de evoluo.

Ankaŭ ni iom uzu nian fantazion por konkretigi niajn pensojn kaj sentojn per simplaj,

ordinaraj vortoj, t. e. figure aŭ vortpentre. Tio estas ludo multe pli valora ol la kruc-enigma ludo per neologismoj. Vi scias, ke s-ro Ce kaj liaj adeptoj povas mirinde interkompreni kun siaj lernantoj dank' al tio, ke ili plene utiligas la esprimeblojn kaj kombineblojn de la malmultaj kursaj vortoj. Eble tiaj interparoloj, dum kiuj „akvo venas el la okuloj“ ktp., ŝajnas iom ridindaj al maturaj esperantistoj, kiuj ŝatas esprimi sin pedante korekte. Sed verdire tio estas natura kaj treege valora uzado kaj evoluigo de la lingvaj eblecoj. Se ekzistus Ce-kursoj ankaŭ por perfektaj esperantistoj, tiam ni certe ne bezonus centojn kaj milojn da novaj vortoj por esprimi niajn pensojn kaj sentojn, kaj mi estas plene konvinkita, ke ni tamen esprimus ilin pli vive kaj pli elegante ol per amaso da senvivaj neologismoj.

Stellan Engholm.

Recenzo.

Dr. Ernst Sós: Dictionnaire actuariel des langues Esperanto—Allemande—Anglaise et Française (Aktuara vortaro de la lingvoj Esperanto, germana, angla kaj franca). Eldonloko kaj prezo nemontritaj.

Tiu ĉi verketo enhavas sur dekse paĝoj la teknikajn esprimojn pri asekurado. Nature, por traduki kelkajn terminojn estis necese enkonduki novajn radikojn, sed ni rimarkis kun plezuro, ke ili estas malmultaj kaj, ĝenerale, trafe elektitaj.

Nur specialistoj povas juĝi pri la taŭgeco de la Esperantaj tradukoj, sed oni permesu al ni kelkajn rimarkojn.

Ni trovas datlimeco por traduki „Fälligkeit; maturity; échéance“; ĝi estas esprimo proponita de Zamenhof kaj registrita de ĉiuj vortaristoj; tamen, ĉu (pag)matureco ne estas pli bona kaj tuj komprenebla esprimo? „Ableitung; derived function; dérivée“ oni ne traduku per **dedukto**, sed per **derivaĵo**, laŭ „Matematika Terminaro“ de R. Bricard (1905) kaj „Scienca fundamenta esperanta terminaro“ (1931). — Dekrement-tabelo ne estas facile komprenebla, kiel estus imitaĵo de la franca kaj itala esprimoj „table de survie; tavola di sopravvivenza“; ni proponas tabelo pri **postvivo** aŭ **transvivo**. Cetere, ĉu **dekrement-tabelo** ne estas la sama afero kiel **tabelo de morto**? — Anŝtataŭ devio por „Abweichung; déviation; écart“ la suprenomitaj matematikaj terminaroj alprenas ekarto. — Kial la germanismo **devo** pri sinanonco, kaj ne **devo** pri **deklaro**? — **Domaĝo** estas uzata, kiel tro ofte nuntempe, laŭ nefundamenta, konfuziga maniero; por forigi la miskomprenojn, oni proponis **domaĝo**, sed la vortojn, kiuj diferencas nur per unu litero, oni prefere evitu. Kial ne uzi, plivastigante ĝian signifon, la internacie bone konatan vorton **averto**, se difekto ŝajnas nesufiĉa? — Aliaj terminoj ne bone elektitaj estas: **frekventeco** („ofteco, frekvenco“); **grupa asekuro** („opa asekuro“); **jarkvoto** („jarpago“); **kompensigo** („kompensio“); **konverto** („aligo, transformo“ aŭ eble „konversio“); **maklero** („maklerado, kurtaĝo“); **memreteno** (nekomprenebla: „propra risko“ laŭ angla kaj franca esprimoj); **miksata asekuro** („miksa a.“); **morteco** („mortofteco, mortokvanto“); **premio** (internacia, sed konfuziga: „[asekura] partopago“ laŭ Bennemann); **reguligo de domaĝo** („kompensio por akcidento“); **tezo** („teoremo“); **temporara asekuro** (?); **viv-atendo** („meza ĝisvivo“). — **Procento, procentkvoto, rentumigo, rentumprocento** est-

igas tian implikaĵon, ke oni devas rezigni ĝin malimpliki; cetere, bonvolu kompari la difinojn de **rento, procento, interezo, kvoto**, en la „Plena Vortaro“ kaj vi vidos la konfuzon tie regantan.

En la artikolo „Notoj pri Occidental“ en n-ro 2 de „Lingva Kritiko“ estas eldiritaj kelkaj kritikoj, kiuj ŝajnas al mi ne justaj, kaj ankaŭ kelkaj eraroj: **apporter, adporter**, utular, sapientar, scriacher k. c. ne ekzistas en Occidental.

La regulo pri **ch** estas false donita. La elparolo **h** (aŭ **k** permesita por personoj ne povantaj elparoli **h**; ankaŭ inter esperantistoj ekzistas tiaj) ne estas post konsonanto sed antaŭ konsonanto (**yacht, technica**), kaj en kombino kun **y** (**psyche, pachyderm**). Ĉu oni elparolas tiun **h** kiel en **D. machen** aŭ **ich** estas vere egale. Ankaŭ en Esperanto la elparolo diferencas laŭ la nacieco de la parolantoj. „Cavall“ estas elparolata laŭregule, do kiel en itala lingvo, kaj ne „mouillé“ kiel en hispana. La formo **cav-al** estus erariga, kyzaŭ adjektivo de **cav**.

leibil havas akcenton sur la unua **i**, kiel la regulo postulas, la formo mem estas regule derivita kaj egala al la hispana, do per kio ĝi ne sukcesas?

La akuzativa formo estas necesa nur en la pronomoj, kiel montras la plejmulto de modernaj lingvoj. La neŭtra pronomo en nenia eŭropa lingvo havas apartan akuzativan formon, do estas superflua ankaŭ en lingvo internacia.

La pluralsigno estas **s** aŭ **es**, laŭ eŭfonio, la sono **e** estas laŭvola ankaŭ en la fino de vortoj.

„**yo**“ certe ne estas internacia, sed ĉu Esperanta „**mi**“ estas pli internacia? Reale internacia formo ne ekzistas, do pro kio tia kritiko? Oni ne devas esti maljusta.

yo kaj **me** ne estas egalaj, **me** estas akuzativo de **yo**.

Kial angla sufikso **-li** estas malpermesita, se eĉ en angla lingvo ni havas „**firmness, backvardation**“?

„**fe amar**“ kaj „**amat**“. Sama diferenco kiel inter Esperanta „**amis**“ kaj „**amadis**“.

La fonetike similaj afiksoj ankaŭ sence estas similaj kaj en multaj lingvoj eĉ identaj, tiel la senco en la kunteksto ne estas dubebla, ankaŭ okaze de eraroj, do praktike utila.

Plue la kritikanto miras pri ne-internaciaj kiel: **inmanuar, trigemell, tempran, stulton** k. c. Nu, ne estas eble konstrui ian lingvon sole per internaciaj vortoj, ĉar por multaj ideoj ne ekzistas internaciaj. Tial oni en tiaj okazoj devas aŭ sekvi la formojn de ia ekzistanta lingvo aŭ formi proprajn derivaĵojn. Kiu konas la kvazaŭ eksplodan evoluon de la novaj lingvoj de malgrandaj nacioj, kiel estona, latva, litova, irlanda kun miloj da noveformitaj propraj vortoj mem anstataŭ ekzistantaj internaciaj, trovos nenion kontraŭnaturan aŭ malpermesitan en tiu procedo. Tiun rajton de propra natura evoluo ĝuste Esperanto, kiu uzas ĝin speciale ofte, ne povas kritiki en alia vivanta lingvo. Mi neniam kaj nenie diris ke ĉiuj occidentaltaj vortoj estas internaciaj, sed sole ke ĉiuj internaciaj ne estas deformataj.

Cetere inter „**limitation**“ kaj „**limitita**“ estas la sama diferenco kiel inter **D. Begrenzung** kaj **Begrenztheit**, inter „**nordal**“

La verketo ne estas sen prezeraroj; tamen ĝi estas rezulto de aprobinda klopodo por serioze starigi tre fakspecialan terminaron.

Stefano La Colla.

Respondo al kritiko.

kaj „**nordic**“ kiel **D. nördlich** kaj **nordisch**), „**inmanuar**“ havas paralelojn en **Rum, inminä, D. einhändigen, R. w-ruĉat**; „**rebellic**“ estas **D. rebellisch**, „**selfic**“ = **D. selbstisch**, „**trigemell**“ = **S. trigemelo**, „**tempran**“ = **S. temprano**, „**lucrar**“ = **S. lucrare**. **D. lukrieren** k. c. Occidental ne estas kopio de **A. F.**, sed nova moderne derivita latinida lingvo kaj la senco de l' vorto „**internacia**“ devas esti komprenata pli amplekse ol **AFD**.

Ankaŭ la ŝajna pleonasmo estas sole riĉeco kaj precizeco, se estas necese, sed neniel deviga: ekz. „**scrition**“ estas **D. das Schreiben**, „**scritura**“ = **die Schrift**. Ankaŭ Esperanto havas multajn duoblaĵojn, sed sen tiela diferenco, ekz. **redaktoro** — **redaktisto** k. c. La alternativaj radikoj en la vortaro de **Gär** estas en eksperimentado, kaj multaj el ili jam antikvigintaj, same kiel en **Esp. la Zamenhofa „elrigardi“** nun estas „**aspekti**“. Tio estas la vivo!

La kritikanto estas ŝokata de „**ples, self, mey**“ en latinida lingvo, sed ĉu „**hundo**“ ne estas ankoraŭ pli ŝokanta por germano kaj „**la pairto**“ por latinido?

La angla kaj la rumana lingvoj montras kiel oni povas enigi en la lingvon alilingvan materialon, ne per formoj kiel **hundo, ŝraŭbo**, sed per skriba kaj sona konformigo, kiel en Esperanto la bone akorditaj vortoj „**tondro, ricevi, streĉi**“ k. c. Tion Occidental ĝenerale sukcesis atingi. Malbonaj formoj estos forigitaj per la natura evoluo. Ankaŭ en Esperanto ne estas uzataj ĉiuj eblaj kunmetaĵoj, faritaj de nekompetentaj novuloj.

E. de Wahl.

* Ĉu en Esperanto oni povas esprimi tian diferencon? Al mi ŝajnas ke ne!

Pres-eraroj.

Artikolo „**Tuno**“ (L. K. n-ro 5).

En tekstlinio 7 legu vorton anstataŭ vorto.

Artikolo „**Grupo-reagoj**“ (L. K. n-ro 6).

I. Formulo 5 tekstas: **viba 2, viba = verbulo**.

III. Ĉapitro 1, Substancaĵoj: En tekstlinio 5 legu „**uj, ing, il**“ anstataŭ „**ul, ing, il**“.

III. Ĉapitro 2, Agoj: La alineo tri „**Adjektiva radiko reagas tiel**“ estas nur parte presita. La manuskripto tekstas: **Adjektiva radiko reagas tiel:**

1. Kun nura „**i**“ ĝi signifas „**esti**“ tia, ekz. **grandi** = esti granda.
2. Tial la **influanto** devas ricevi la verbon kun „**ig**“, la **influato** la verbon kun „**iĝ**“; ekz. mi grandigas truon, truo grandigas. Adjektiva radiko do havas la reagan leĝon:

influanto : influato = igi : iĝi.

Verba radiko reagas alie:

1. aŭ la **influanto** ricevas la simplan verbon, la **influato** tiun verbon kun „**ig**“; ekz. ŝtono falas, mi falligas ŝtonon,
 2. aŭ la **influanto** ricevas la simplan verbon, la **influato** tiun verbon kun „**iĝ**“; ekz. mi jetas ŝtonon, ŝtono jetigas.
- Verba radiko do havas la reagan leĝon:
influanto : influato = igi : i = i : iĝi.